

Antaŭparolo

Bonvenon al nova kajero de *Esperantologio / Esperanto Studies*. Iasence temas pri la tria manifestiĝo de tiu ĉi revuo, kies historio komenciĝis jam en la jaro 1948. En tiu jaro la konata dana sciencisto Paul Neergaard lanĉis la revuon *Esperantologio* kiu fariĝu “internacia revuo por la lingvistiko kaj bibliografio de Esperanto”. La revuo havis, aldone al la redaktoro Paul Neergaard, eminentan redaktan komitaton kies nomoj ankoraŭ hodiaŭ resendas nin al kelkaj el la plej gravaj kontribuoj al la scienco de esperantologio: Collinder, Collinson, Kalocsay, Kawasaki, La Colla, Lippmann, Manders, Privat, Ramstedt, Waringhien, Wüster. Tra siaj ses kajeroj, kiuj aperadis inter 1948 kaj 1961, estas trovebla amaso da utilaj, eĉ esencaj, kontribuajtoj al la studkampo esperantologio, foje tro neglektataj de niaj nuntempaj esperantologoj.

En 1999 eminenta esperantologo de posta generacio sed el apuda lando, nome Svedio, relanĉis la revuon de Neergaard. Temis pri la matematikisto kaj estonta prezidanto (2013-2015) de la Akademio de Esperanto, Christer Kiselman. Inter 1999 kaj 2018 aperis ok kajeroj de *Esperantologio / Esperanto Studies* sub lia redakto, alireblaj rete kaj en presita formo. Li jam en la komenco promesis aperigi entute ok kajerojn tra pluraj jaroj. Kiam do aperis la oka en 2018, li anoncis sian intencon retiriĝi.

En 2019 okazis diskuto en la sino de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED) pri eventuala estonteco de la revuo. Samtempe oni pridiskutis alian problemon, nome, ke ĝis la jaro 2013 aperadas jam de kelkaj jaroj ĉiujara kajero de la referaĵoj de la Esperantologia Konferenco – ankaŭ dank’ al la persisto de ties iama organizanto profesoro Kiselman (kaj antaŭ li d-ro Detlev Blanke). Sed la referaĵoj de 2014 sidis sen eldoniĝo jam kelkajn jarojn. Similan sorton suferis tiuj de postaj jaroj.

En la kunveno de CED dum la Universala Kongreso en Lahti en 2019 estis findecidita nova aranĝo por *Esperantologio*: ĝi aperu sub nia redakto kaj sub la ŝildo de CED, kaj ni utiligu ĝin en la komenco ĉefe

por aperigi referaĵojn de la Esperantologiaj Konferencoj de lastaj jaroj, inter kiuj troviĝas amaso da utila esperantologia materialo.

Jen, do, la unua kajero de la tria serio de *Esperantologio*, kiu enhavas la referaĵojn de 2014 en redakto de José Antonio Vergara kaj Esther Schor. Sekvos en postaj kajeroj referaĵoj el postaj jaroj.

Se la revuo *Esperantologio* aperadis jen fluse jen malfluse, aliflanke la Esperantologia Konferenco restis konstanta ero de la Universala Kongreso de UEA de 1978 ĝis la pandemia interrompo ĉi-jara. Ĝia ĉefa inspiranto estis la konata orientgermana esperantologo Detlev Blanke – kaj ĉirkaŭ li troviĝis teamo de entuziasmoj, inter ili Jonathan Pool, François Lo Jacomo, Naokazu Kawasaki kaj Humphrey Tonkin. CED estis la organizanta institucio. Skribis Detlev Blanke en la kongresa libro de la Universala Kongreso de 1978 en Varno, Bulgario:

La bezono por la Konferenco fontas el du ĉefaj konsideroj. Unuflanke, kreskas en ekstermovadaj sciencaj rondoj la konscio pri la ekzisto de internaciaj lingvaj problemoj kaj la preteco pli serioze okupiĝi pri Esperanto; aliflanke, malrapide evoluas la sinadaptado de esperantologoj al tiu tendenco. La Konferenco estos do forumo por jam agantaj esperantologoj kaj servos samtempe kiel stimulo por aliaj kapabluloj komenci la scian studon de Esperanto.

Blanke rekonis ion, kion multaj esperantologoj ne rimarkis. Alkutimiĝinte al scienca mondo kiu malestimas Esperanton kaj malofte publikigas artikolojn pri ĝi, la esperantologoj ne atentis, ke, sub la influo de novaj sociaj aliroj al lingvoj kiuj inkluzivas socilingvistikon, lingvan politikon kaj rilatajn kampojn, la malfermiteco de fakuloj al novaj esplortemoj, al studado de vasta gamo de lingvaj fenomenoj, kreskis. Necesis seriozigi la esperantologojn kaj konvinki ilin eniri la scian fluon, kie ili estos pli bone akceptataj ol en pasinteco.

La Esperantologia Konferenco de 1978 estis tre ambicia afero: tri sesioj dise tra la kongresa programo, konsistantaj el ĉiufoje tri referaĵoj. Ne eblus ĉiujare preni tiom da spaco en kunpuŝita kongressemajna programo nur por esperantologio. En postaj jaroj la konfe-

renco estis kutime prezentata en unusola tago, ĉiam kun nova temo kaj nova prelegantaro. Ĝi fariĝis kvazaŭ interŝanĝejo de ideoj por tiuj kiuj okupiĝas pri ĉiuj aspektoj de esperantologio. Nuntempe suplementas ĝin la laŭokazaj Nitobe-Simpozioj de ESF (Esperantic Studies Foundation) – kaj en 2018 kaj 2019 postkongresaj rendevuoj de esperantologoj sub aŭspicio de CED.

Kvankam la revuo de CED *Language Problems and Language Planning (LPLP)* daŭre aperas ĉe la eldonejo John Benjamins en Amsterdamo, kaj kvankam ĝi aperigas okazajn interlingvistikajn artikolojn, ĝia temaro estas tro vasta por kontentigi la bezonojn de eldonemaj esperantologoj. Helpis tiurilate la pola revuo *Język Komunikacja Informacja*, sub redakto de Ilona Koutny kaj Ida Stria, kiu ofte aperigis esperantologian materialon. Tamen, estas bezonataj pli da alireblaj fontoj de artikoloj. Ni esperas, ke, post rekupto de la ritmo de la Esperantologiaj Konferencoj, la nova *Esperantologio / Esperanto Studies* povos ankaŭ rekapti tiun stafeton kaj ludi denove rolon kiel eldonloko de bona esperantologia kontribuado. Tio dependas parte de ni mem, sed parte de niaj legantoj kaj kontribuantoj.

Humphrey Tonkin
Orlando Raola